nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2016

## ANTAŬKONGRESA AKTIVADO EN MADRIDO

La prokrasto de tiu ĉi numero de Nia Voĉo ŝuldiĝas al la okazigo de la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis inter la 30-a de junio kaj la 4-a de julio en Herrera del Duque. Temis pri tre sukcesa evento, kun 150 efektivaj ĉcestantoj, kaj tre granda varieco de programeroj.

Kiel ni anoncis en la pasinta numero, HEF kaj MEL organizis diversajn aktivadojn en Madrido, en la tagoj antaŭaj al la Kongreso en Herrera.

La lundon 27-an de junio estis organizita promenado tra la historia Madrido, kiun gvidis Águeda Biurrun, kun multaj partoprenantoj, kelkaj el ili el aliaj nordaj landoj, kiuj eltenis la varman sunon madridan.

La saman tagon je la 20,00 okazis prezentado de la Hispana Kongreso de Esperanto de Herrera del Duque, en la kultura asocio *Agrupación Extremeña de Alcorcón*. Ĝi estis prezentata de ties prezidanto, kaj poste parolis la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, la prezidanto de la Loka Organiza Komitato de la Kongreso, Javier Romero, kaj la skabenino pri kulturo de la urbo Herrera del Duque, Ángeles Toledo. Post tio, estis organizita malgranda koncerteto de la grupo "Sepa kaj Asorti", per improvizitaj muzikiloj, kaj poste invito je "hispana vino" (gustumado de lokaj frandaĵoj). Ĉeestis sesdeko da homoj, esperantistoj kaj anoj de la ekstremadura asocio.



La mardon 28-an okazis malgranda festo en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, por bonvenigi vizitantajn invititojn, kaj speciale omaĝi la artistojn Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj festis siajn arĝentajn nuptojn tiun tagon. Poste oni iris kune promene al la komenco de Bohemia Nokto, promeno tra la lokoj kie disvolviĝas la teatraĵo Bohemiaj Lumoj, de Valle-Inclán.


Ankaŭ okazis promenado la merkredon 29-an, ĉikaze tra la mezepoka Madrido; ĝin gvidis Félix Jiménez.



## POSTKONGRESA RENKONTETO

La 5-an de julio, post la reveno el Herrera, kaj survoje al siaj flugoj el Madrido, kunvenis por agrabla babilado kun madridaj esperantistoj kelkaj eksterlandaj partoprenintoj en la Kongreso. En la foto troviĝas István Ertl kaj Sara Spanò, kiuj jam antaŭe vizitis nin, kun Jorge Camacho ĉe la statuo de Ramón María del Valle-Inclán, la aŭtoro de "Bohemiaj Lumoj".

## DON QUIJOTE DE LA MANCHA, EN BITA FORMATO




La 1-an de julio, en la kadro de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis prezentita la bita eldono de "La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha", la traduko al Esperanto de la senmorta verko de Miguel de Cervantes.

La verko estas nun je la dispono de ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo, libere kaj senpage, en formato epub, en la *Bitoteko*, la bita biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi ankaŭ elŝuteblas el la *Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes*, la plej grava hispana institucio zorganta pri la hispanlingva literaturo en elektronika formato, kun kiu HEF interkonsentis pri la samtempa disponigado al la ĝenerala publiko. La adreso en tiu ĉi retejo estas http://www.cervantesvirtual.com/obra/la-ingenia-hidalgo-don-quijote-de-la-mancha/.

Vi povas trovi la ligilojn al la verko kaj pliajn informojn pri la projekto en la retadreso http://esperanto.es/quijote.

## INTERNACIAJ KONGRESOJ

La 101 Universala Kongreso de Esperanto, disvolviĝos inter la 23a kaj 30a de julio 2016 en la slovaka urbo Nitro (Nitra). Pliajn informojn en: http://www.uea.org/kongresoj/UK

La 72a Internacia Junulara Kongreso celebriĝos inter la 16a kaj 23a de julio 2016, en Vroclavo, Pollando. Pliaj informoj: http://ijk2016.tejo.org/. En la samaj datoj, okazos en Herzberg-am-Harz, Germanio, la 89a Kongreso de SAT: http://www.satesperanto.org/.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 5-a de julio, post la 18,30, sed en aŭgusto tre probable oni fermos la sidejon dum plej multaj tagoj. Do, se vi intencas viziti la sidejon, estas prudente certiĝi antaŭ ol alveni. Verŝajne ankaŭ ne okazos la unuasabataj renkontoj, ĝis septembro.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la fejsbukan forumon https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

ĜUU FELIĈAN, RIPOZIGAN KAJ ESPERANTISTAN SOMERON!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com